

Prezento de la libro *Rusoj kaj Moravio III*, okazis sub aŭspicio de ĝenerala konsulo de Rusa Federacio en Brno Andrej Šaraškin 18.1.2014 je la 15-a horo, AS Club, Brno-Jundrov, Veslařská 67, organizis RKOSM, o.s., PdF a FF MU, Nakladatelství Jan Kux.

Temis pri prelegaro de la tria internacia scienca-literatura konferenco Rusoj, Rusio kaj Moravio, okazinta 5.1.2013. La konferencon partoprenis esperantistoj Margit Turková kaj Jan Werner. M. Turková prelegis ĉeĥlingve pri la temo *Rusistoj, rusoj kaj esperantistoj* kaj ŝia prelego aperis en la nova libro.

Tial esperantistoj estis invititaj kaj poetino Ljubov Vondroušková eĉ prezentis nian grupon (Margit Turková, Viktor kaj Libuše Dvořák, Věra Podhradská, Milada Vondroušková, Oldřich Arnošt Fischer kaj Miroslav Malovec). Margit Turková kaj Viktor Dvořák eĉ ricevis vorton por prezenti la kunlaboron de esperantistoj, rusistoj kaj rusaj bohemiŝoj ĉe disvastigado de la rusa kaj ĉeĥa kulturoj, ekz. de poemoj de O. Březina.



Dum la programo estis honorita profesoro de Masaryk-universitato Ivo Pospíšil, kiel eble plej grava nuntempa slavisto per medalo. Prezenti estis la

unuopaj prelegoj en la prelegaro kaj la libro poste disdonita. Inter la programeroj profesia muzikisto gitarludis kaj kanzonistino kantis rusajn kantojn. Fine estis ĉiuj invititaj al svedaj tabloj kun rusaj manĝoj kaj moravia vino.